§ Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Februaro: 3 2023

# ĈILIO APROBIS LEĜON KONTRAŬ GEEDZIĜOJ INTER MALPLIAĜULOJ

La Ĉambro de Deputitoj de Ĉilio aprobis leĝon laŭ kiu estas malpermesitaj geedziĝoj se ambaŭ geedzoj ne estas almenaŭ 18-jaraĝaj. Ĝis nun 16-jaraĝuloj rajtis geedziĝi se ili ricevis la konsenton de gepatroj aŭ kuratoroj. Laŭ la nova leĝo geedziĝoj inter malpliaĝuloj estos tute ne-validaj, eĉ se ambaŭ geedziĝantoj akceptis aŭ la tempo pasis kaj ili jam fariĝis plenkreskuloj, tiel ĉiukaze tiu geedziĝo estus tute ne-valida.



Dum la debatoj en la Parlamento, ĉiliaj deputitoj asertis, ke tiu malvalidigo signifas respekton al la Homaj Rajtoj, ĉar la akcepto de tiaj geedziĝoj minacas la realigon de la rajtoj de ne-plenkreskuloj. Dum la sesioj oni diskonigis statistikon laŭ kiu ,en Ĉilio okaze de geedziĝoj kie partoprenis malpliaĝulo, plej ofte inoj, la diferenco inter ambaŭaj aĝoj estis pli ol 20 jaroj. Tiel, junulinoj 16-jaraĝaj edziniĝis al 38-jaraj viroj.

UNICEF bonvenigis ĉi tiun novan ĉilian leĝon. Laŭ la Infan-Fonduso de la Unuiĝintaj Nacioj geedziĝo inter ne-maturuloj, foje eĉ infanoj, metas en risko ilian vivon kaj sanon. Jam en la jaro 2015 UNICEF petis al Ĉilio pligrandigi la aĝ-limon de novaj geedziĝantoj kaj tiel eviti grandan nombron de gravedoj inter adoleskantinoj.

Laŭ statistikoj, en Latin-Ameriko 25% el virinoj edziniĝas antaŭ sia 18-vivojaro. Ĉi tiu regiono estas la dua mondo-parto kie gravedoj inter adoleskantinoj pleje abundas. UNICEF sciigis, ke edziniĝitaj adoleskantinoj riskas suferi malbontraktadojn, ili ofte ne daŭrigas siajn studojn kaj foje ili estas apartigitaj de sia familianoj. Laŭ kalkuloj de tiu UN-organizaĵo en la mondo pli ol 115 milionoj da homoj geedziĝis kiam ili estis malpliaĝaj.

# *Vorto de la Semajno*

## Civila Juro:

1. Tuto de devigaj reguloj koncernantaj nur la interpersonajn rilatojn kaj pli speciale: ne kriminala.

Inter aliaj aferoj la Civila Juro pritraktas aferojn rilataj al:

- la personoj.
- La familio.
- La posedaĵoj kaj la proprieto.
- La heredoj.
- La donacoj.
- La kontraktoj kaj la ŝuldoj.
- La civila respondeco.
- La garantioj kaj
- la privilegioj.

*Sinonimo: Interna Juro.*

*Por pristudi ĉiun kazon oni devas priatenti la civilan juron de la ŝtato, en kies teritorio la koncernaj agoj okazas.*

**INTERNACIA JURISTA ESPERANTO - ASOCIO**

Ni deziras pligrandigi la jurajn vortarojn Esperanto-nacia lingvo kiuj troviĝas ĉe www.esperantojuro.org. Ĝis nun ni disponas pri vortaroj Angla-Eo, Hispana-Eo kaj Portugala-Eo. Ĉu vi estus preta helpi nin en la pligrandigo de tiu vorto-bazo? Se vi emas traduki kelkcenton da juraj vortoj en vian lingvon kaj ordigi ilin, bv. kontakti kun ni. Ni dezirus disponi almenaŭ de 10-lingva vortaro dum la kuranta jaro.

Kontaktu kun jurista@esperanto.ac